

4a PASKA DIMANĈO – 17° de aprilo 2016

## AL MIAJ ŜAFOJ MI DONAS VIVON ETERNAN

Komento al la Evangelio de P. Alberto Maggi OSM

El la evangelio laŭ Johano 10, 27-30

**En tiu tempo Jesuo diris: „Miaj ŝafoj aŭskultas mian voĉon; Mi konas ilin, kaj ili Min sekvas. Al ili Mi donacas vivon eternan: ili neniam pereos. Neniu forkaptos ilin el mia mano. La donaco de Mia Patro, kiu donis ilin al Mi, superas ĉiujn donacojn; pro tio neniu povas forkapti ilin el la mano de mia Patro. Mi kaj la Patro estas unu.“**

Ĉiufoje, kiam Jesuo, la filo de Dio, kaj mem Dio, troviĝas en la templo de Jerusalemo, la loko plej sankta surtere, la loko plej sankta en Jerusalemo, la loko kie, laŭ ĉies opinio, ĉeestas Dio mem, nu, ĉiufoje la situacio estas konflikta. En la hodiaŭa teksto Jesuo troviĝas lastafoje en la templo, en la Jerusalema sanktejo, kaj ĉifoje oni eĉ klopodos Lin ŝtonumi.

Ni vidu, kio okazis. Tiucele ni enmetu ĉi tiujn malmultajn versiklojn en la pli ampleksan kuntekston aluditan de Johano. Ni estas en la mezo de unu el la ĉefaj Izraelaj festoj, la festo de la dediĉo, do de la rekonsekro de la templo, plenumita de Judaso Makabeo en la jaro 165 a. K.

En tiu okazo oni lumigis egan kandelabron, kaj tial la solenon oni nomis lumofesto. Evidente estas konflikto inter tiu lumofesto kaj Jesuo, Sin prezentanta kiel la lumon de la mondo. Li tion diris jam antaŭe.

Fakte, kiam Jesuo eniris la templon, tuj la eminentuloj Lin ĉirkaŭis, kaj demandis laŭvorte: “Ĝis kiam vi fortenos nian vivon? ( Joh 10,25). La misio de Jesuo estis, redoni la vivon al la popolo, kaj tio signifis, teni ĝin for de la regantaj eminentuloj. Nu, Jesuo al la ĉefaj religiuloj, al la reprezentantoj de Dio, parolas tre severe: “Vi ne kredas, ĉar vi ne estas el Miaj ŝafoj” (Joh 10, 26). Jesuo estis prezentinta Sin kiel la veran paŝtiston, senditan de Dio por kunigi la popolon, la ŝafaron, sed Li asertas, ke iuj ne apartenas al tiu ŝafaro.

Kaj kiuj ne apartenas? Ĝuste la ĉefpastroj, kiuj opinias, ke ili plenrajte estas la plej proksimaj al Dio, laŭ Jesuo estas for. Ni venu nun al la hodiaŭa liturgio. “En tiu tempo Jesuo diris: „Miaj ŝafoj... do Li konfirmas, ke la ŝafoj apartenas al Li, ke estas Li la vera paŝtisto, ĉar la vera paŝtisto oferas sian vivon por siaj ŝafoj ... aŭskultas mian voĉon”; La voĉo de Jesuo, do de Dio,

estas la respondo de Dio al la bezono de plenposedo de Dio, kiun ĉiu persono tenas en si. Kio estas la eco de la voĉo de Jesuo? Ke la mesaĝo de amo ne kuntrenas devigon, ĝi estas donaco, pura propono. *Mi konas ilin, ...*".

Rimarku la verbon "koni". Per ĝi Johano indikas konon vere intiman, profundan "*...kaj ili Min sekvas*"; Jesuon ili sekvas, ĉar ĉe Li ili trovas respondon al sia viv-idealo, kion ne trovas la altranguloj. Jesuo diros: "*Almenaŭ kredis la farojn*" (Joh 10, 38). Sed ili ne povas kredi tiujn farojn, ĉar la faroj de Jesuo celas redoni la vivon al la popolo., male, tiun vivon ili sufokas.

Kaj Jesuo daŭrigas: "*... Al ili Mi donacas vivon eternan:*" Tiun temon Johano ŝatas. La eterna vivo ne estas merito, ĝi estas donaco Dia, kaj la eterneco ne montras daŭron ĉiaman, sed nedetruoblan.

"*ili neniam pereos. Neniu forkaptos ilin el mia mano.* Kaj tiu estas admono severa, tute klara, al la religiaj aŭtoritatoj: ili ne kuraĝu forŝiri tiujn ŝafojn de mano Lia. Estos Li la paŝtisto oferonta sian vivon por siaj ŝafoj. *La donaco de mia Patro, kiu donis ilin al Mi, superas ĉiujn donacojn*". Tiu versiklo estas malfacile interpretebla, ĉar ĝi alvenis al ni laŭ kvin variantoj, tiel, ke oni ne certas pri tio, kio superas. Laŭ ni, la plej grava estas la ŝafaro, kiun lasis la Patro al la Filo. Do la ŝafaro estas la plej granda donaco farebla de la Patro al la Filo. Kaj Jesuo konkludas": "*pro tio neniu povas forkapti ilin el la mano de mia Patro*", do ne plu "*Mia mano*", kiel unu versiklon antaŭe. Oni ne plu distingas inter Jesuo kaj Dio, kiel faris la religiaj eminentuloj. Dio kaj Jesuo. Jen la atesto de Jesuo: "*Mi kaj la Patro estas unu*". Do la ŝafaro estas en la mano de Jesuo, kiu estas la mano de la Patro. Kaj neniu klopodu ree ŝteli tiun ŝafaron, kiel faris la aŭtoritatoj. Kaj jen la frazo, kiu estos fatala al Li, la blasfemo. Post ĝi estos decidite linĉi Jesuon, Lin ŝtonumi.

Nombro unu en la Biblia simbolaro montras la diecon. Do la atesto de Jesuo signifas certe, ke Li estas Dio, kiel Dio estas la Patro. Tio estas blasfemo netolerebla. Ĉi tiu estas la plenumo de tio anoncita en la komenco de lia evangelio: "*Neniu iam vidis Dion; la solenaskita filo, kiu estas en la sino de la Patro, Lin deklaris*" (Joh 1, 18). Jesuo ne estas sendito de Dio, nek profeto, sed la manifestiĝo videbla kaj surtera de tio, kio estas Dio.

Jen kial Jesuo diras "*Mi kaj la Patro estas unu*". Post tiu frazo leviĝas pelmelo. Johano skribos, ke la estroj prenos ŝtonojn por Lin ŝtonumi, kaj asertos: "*Ne pro bona faro ni volas ŝtonmortigi vin, sed pro blasfemo, kaj ĉar vi, estante homo, pretendas esti Dio*" (Joh, 10, 33).

Do la projekto de Dio por la homaro, ke ĉiu homo iĝu Lia filo, kaj spertu vivon Dian, laŭ la religiaj estroj, kiuj devis konigi tiu projekton al la mondo, estas blasfemo puninda per morto.